# Kiel la mondo saviĝis

## Stanisław Lem




| **Tradukis Matthew McLauchlin el la angla traduko fare de Michael Kandel el la pola** | **El la pola tradukis mgr Jerzy Wałaszek** |
|---|---|
| Iam Trurlo la konstruisto kunmetis maŝinon kiu povis krei ion ajn komenciĝantan per la litero n. Kiam ĝi estis preta, li provis ĝin, ordonante ke ĝi faru nadlojn, kaj sekve nankenojn kaj negliĝojn, kion ĝi faris, kaj najlu la tuton al nargileoj plenaj de nepento kaj multaj aliaj narkotaĵoj. La maŝino elfaris liajn instruojn ĝis la ĝusta litero. Ankoraŭ ne tute konvinkite de la kapablo de la maŝino, li laŭvice produktis per ĝi nimbojn, nudelojn, nukleojn, neŭtronojn, nafton, nazojn, nimfojn, najadojn, kaj nasturtiojn. La lastan ĝi ne povis fari, kaj Trurlo, kompreneble ĝenite, postulis eksplikon.<br><br>"Neniam priaŭdis ĝin antaŭe," diris la maŝino.<br><br>"Kio? Sed ĝi nur estas tropeoloj. Vi scias, la floro, la planto -"<br><br>"Sed tropeoloj komenciĝas per t, kaj mi nur funkcias pri n."<br><br>"Sed en la latina ĝi estas ja nasturtium."<br><br>"Jen, amiko," diris la maŝino, "se mi povus fari | Foje la konstruanto Trurl konstruis maŝinon, kiu povis fari ĉion komencantan je la litero "n". Kiam ĝi estis finita, eksperimente li ordonis, ke ĝi faru nigran nadlon kaj naŭ novajn nitojn, kaj poste ke ĝi enĵetu ilin al niĉo, kion ĝi ankaŭ faris. La ordono estis plenumita litere, sed ĉar li ankoraŭ ne estis tute certa, ĉu ĝi funkcias korekte, unu post unu ĝi devis fari neŭtronojn, notojn, nazojn, nimfojn kaj nerdicolukon. La lastan ĝi ne scipovis fari, kaj Trurl, tre ĉagrenita, ordonis al ĝi, ke ĝi klarigu sin.<br><br>– Mi simple ne scias, kio ĝi estas – klarigis la maŝino. – Mi neniam aŭdis pri io simila.<br><br>– Kial? Ĝi estas do la oksigeno, la gaso, la elemento...<br><br>– Se ĝia nomo estas "oksigeno", ĝi komencas je la litero "o", kaj mi scipovas fari aĵojn nur je la litero "n".<br><br>– Sed en la galaksilingvo oksigeno nomiĝas nerdicoluko. |

| | |
|---|---|
| ĉion kiu komenciĝas per n en ĉiu ebla lingvo, mi estus Maŝino Kiu Povas Fari Ĉion En La Tuta Alfabeto, ĉar en tiu aŭ alia fremda lingvo sendube komenciĝas per n iu ajn aĵo, kiun vi volas nomi. Ne estas tiel facile. Mi ne povas transpaŝi, kion vi programis. Do neniuj tropeoloj." | – Amato mia – diris la maŝino – se mi povus fari ĉion komencantan je la litero "n" en ĉiaj eblaj lingvoj, mi estus la Maŝino Povanta Fari Ĉion Je La Tuta Alfabeto, ĉar laŭvola objekto en iu lingvo nepre komencas je la litero "n". Tiel bone ne estas. Mi ne povas fari plu ol tio, por kio vi min konstruis. La oksigenon mi ne faros. |
| "Bone," diris Trurlo, kaj ordonis ĝin fari Nokton, kion ĝi tuj faris - ĝi estis malgranda, eble, sed perfekte nokta. Nur tiam Trurlo tieninvitis sian amikon Klapaŭcio la konstruisto, kaj ekkonigis lin al la maŝino, laŭdante ĝian eksterordinaran lertecon tiom ke Klapaŭcio iĝis ĝenita kaj demandis ĉu li ankaŭ povus ekzameni la maŝinon. | – Bone – konsentis Trurl kaj ordonis al ĝi fari la nokton. Ĝi tuj faris unu malgrandan nokton, sed tute nigran. Tiam li invitis al si la konstruanton Klapaŭcjon, prezentis lin al la maŝino kaj tiel longe laŭdis ĝiajn eksterordinarajn kapablojn, ke ĉi tiu kaŝe koleris kaj petis, ke ankaŭ li povu ordoni ion al la maŝino. |
| "Nepre jes," diris Trurlo. "Sed ĝi devas komenciĝi per n." | – Laŭ via volo – diris Trurl – sed tio devas komenci je la litero "n". |
| "N?" diris Klapaŭcio. "Bone, ĝi faru Natursciencon." | – Je la "n"? – demandis Klapaŭcjo. – Bone. Ĝi faru la novsciencon. |
| La maŝino knaris, kaj tuj la antaŭa korto de Trurlo pleniĝis per natursciencistoj. Ili interdisputis, ĉiu eldonanta pezajn volumojn, kiujn la aliaj disŝiris; fore videblis flamantaj ŝtiparoj, sur kiuj, martiroj al Naturscienco fritiĝis; estis tondro, kaj strangaj fungoformaj fumkolonoj leviĝis; ĉiu babilis samtempe, neniu aŭskultis, kaj estis ĉiaj memorandoj, petiloj, juĝalvokoj, kaj aliaj dokumentoj, dum fore flanke sidis kelkaj maljunuloj, freneze skribaĉantaj sur pecoj de papero. | La maŝino ekmurmuris kaj post momento la placo antaŭ la domo de Trurl pleniĝis kun la popolamaso de novsciencistoj. Ili batis kaj tiris unu la alian je kapoj, skribis en dikaj libroj, aliaj forprenis tiujn ĉi librojn kaj disŝiris ilin je pecetoj, en malproksimo estis videblaj bruligantaj stakoj sur kiuj fritiĝis la martiroj de la novscienco, tie kaj tie ĉi io eksplodis, aperis iaj strangaj fumoj similaj al fungoj, la tuta popolamaso diraĉis samtempe tiamaniere, ke neniun vorton oni povis rekoni, de tempo al tempo ili faris memuarojn, alvokojn kaj aliajn dokumentojn, kaj aparte apud piedoj de kriuloj sidis kelkaj solaj maljunuloj konstante skribantaj per malgrandaj literoj sur eroj de disŝirita papero. |
| "Malfia, ĉu ne?" diris Trurlo kun fiereco. "Jen Naturscienco ĝuste, konfesu!" | – Ĉu ne estas supere? – ekkriis kun fiero Trurl. – La similega novscienco, vi mem konsentu! |
| Sed Klapaŭcio ne kontentis. | Sed Klapaŭcjo ne estis kontenta. |
| "Kio, tiu svarmo? Certe vi ne diros ke tio estas Naturscienco!" | – Kio, tiu ĉi popolamaso devus esti la novscienco? La novscienco estas io tute alia! |
| "Do demandu al la maŝino ion alian," ĝendiris Trurlo. "Kion ajn vi volas." Dummomente Klapaŭcio tute ne sciis kion postuli. Sed post iom da penso, li diris ke li postulos du kromajn | – Do diru, kaj la maŝino tuj ĝin faros! – indignis Trurl. Sed Klapaŭcjo ne sciis, kion diri, do li deklaris, ke li ordonos al la maŝino ankoraŭ du aliajn taskojn, kaj se ĝi ilin solvas, tiam li |

| | |
|---|---|
| taskojn de la maŝino; se ĝi povos plenumi ilin, li konfesos ke ĝi estas ĉiom kiel Trurlo priskribis ĝin. Trurlo konsentis pri tio, je kio Klapaŭcio petis Negativon. | certiĝos, ke ĝi estas prava. Trurl konsentis tion kaj Klapaŭcjo ordonis, ke la maŝino faru nicojn. |
| "Negativo?!" kriis Trurlo. "Kio damne estas Negativo?" | – Nicoj! – ekkriis Trurl. – Kiu aŭdis pri tio, kio estas nicoj?! |
| "Malpozitivo, kompreneble," Klapaŭcio diris serene. "Negativaj mienoj, la negativo de bildo, ekzemple. Nu, ne provu ŝajnigi ke vi ne scias kio estas Negativo. Sufiĉe, Maŝino, eklaboru!" | – La alia flanko de ĉio – respondis trankvile Klapaŭcjo. – Nici estas igi al la alia flanko, ĉu vi ne aŭdis pri ĝi? Ho, ne simulu! Maŝino, komencu laboron! |
| La maŝino, tamen, jam eklaboris. Unue ĝi fabrikis kontraŭprotonojn, kaj sekve pozitonojn, kontraŭneŭtronojn, kaj daŭre laboris, ĝis el ĉiu tiu kontraŭmaterio, formiĝis kontraŭuniverso, lumanta kiel fantoma nubo super iliaj kapoj. | Sed la maŝino jam laboris de longa momento. Komence ĝi faris antiprotonojn, poste antielektronojn, antineŭtrinojn, antineŭtronojn, kaj tiel longe ĝi senĉese laboris ĝis kreis multege da antimaterio, el kiu komencis malrapide formiĝi, simila al la strange brilanta nubo sur la ĉielo, la antimondo. |
| "Hm," murmuris Klapaŭcio, malplaĉita. "Tio supozas esti Negativo? Nu... ni diru ke jes, pro la argumento... Sed nun jen la tria ordono: Maŝino, faru Nenion!" | – Hm – diris tre malkontenta Klapaŭcjo – ĝi estus nicoj? Konsente ni diru, ke jes... Por la sankta trankvilo... Sed jen estas la tria ordono: Maŝino! Faru Nenion! |
| La maŝino sidis senmove. Klapaŭcio kunfrotis la manojn triumfe, sed Trurlo diris, "Nu, kion vi antaŭvidis? Vi ordonis ke ĝi faru nenion, kaj jen ĝi faras nenion." | Por pli longa momento la maŝino entute ne moviĝis. Klapaŭcjo komencis kontente froti la manojn, kaj Trurl diris: |
| "Korektigo: mi ordonis ke ĝi faru Nenion, sed ĝi faras nenion." | – Kion vi plu volas? Vi ordonis al ĝi fari nenion, do ĝi ne faras ion! |
| "Nenio estas nenio!" | – Malvere. Mi ordonis al ĝi fari Nenion, kaj tio ĉi estas io tute alia. |
| "Nu, nu. Ĝi devis fari Nenion, sed ĝi ne jam faris ion ajn, kaj do mi gajnis. Ĉar Nenio, mia kara kaj ruza kolego, ne estas via simpla ordinara nenio, la rezulto de laceco kaj neaktivo, sed dinama, perforta Nenioeco, tio estas, perfekta, unika, ĉiea, alivorte, Neekzisto, ultima kaj suprema, en ĝia propra nepersono!" | – Egale! Fari Nenion kaj ne fari ion signifas la samon.<br><br>– Ne! Ĝi devis fari Nenion, kaj dume ĝi ne faris ion, do mi venkis. Ĉar Nenion, mia tromemfida kolego, ne estas tia ordinara nenio, la produkto de pigreco kaj neagado, sed aktiva Nenieco, tio estas perfekta, sola, ĉieĉeestanta kaj la plej alta neestado mem!! |
| "Vi konfuzas la maŝinon!" kriis Trurlo. Sed subite la metaleca voĉo de la maŝino elbruis: | – Vi konfuzigas la maŝinon! – ekkriis Trurl, sed tuj ekaŭdiĝis ĝia bronza voĉo: |
| "Vere, kiel vi povas debateti je tia tempo? Ho jes, mi scias kio estas Nenio, kaj Nenioeco, Neekzisto, Neestaĵo, Neigo, Neeco, kaj Neniomeco, ĉar ĉio el tiuj ĉi falas sub la litero n, | – Tuj haltu vian kverelon! Mi scias, kio estas la Neestado, Nenieco, alinome Nenio, ĉar tiuj ĉi ideoj komencas je la litero "n", kiel la Neekzisto. Pli bone rigardu lastfoje la universon, ĉar baldaŭ |

| | |
|---|---|
| n kiel en Nul. Rigardu do sur via mondo por la lasta fojo, sinjoroj! Baldaŭ ĝi ne plu estos..." | ĝi ĉesos ekzisti... |
| La konstruistoj haltis, forgesinte sian kverelon, ĉar la maŝino fakte faradis Nenion, kaj ĝi faris ĝin ĉi tiel: vice, variaj aĵoj forpreniĝis el la mondo, kaj la aĵoj, tiel forprenitaj, ĉesis esti, kvazaŭ ili neniam estintis. La maŝino jam estis foriginta nolarojn, noktzebojn, nokojn, nakojn, nalirakistojn, novtremeojn, kaj nemalrigobilojn. Kelkfoje, tamen, ĝi ŝajnis ke anstataŭ reduktanta, malpliiganta, kaj subtrahanta, ĝi fakte estis kreskiganta, pliiganta, kaj aldonanta, ĉar ĝi forigis vice, neestaĵojn, nadirojn, naivecon, napalmon, naŭzon, naziismon, neadon, neglekton, novialistojn, nekrofilion, kaj nepotismon. Sed post minuto, la mondo tre definitive ekmaldensiĝis ĉirkaŭ Trurlo kaj Klapaŭcio. | La vortoj ekmortiĝis en la buŝoj de furiozigitaj konstruantoj. La maŝino efektive faris Nenion, tiamaniere ke ĝi unu post la alia forigis el la mondo diversajn objektojn, kiuj ĉesis ekzisti, kvazaŭ ili neniam ekzistis. Ĝi forigis jam natongviojn, nupajkojn, nurkovnicojn, nendziolojn, naluŝkojn, nepietetojn kaj nendasojn. Momente ŝajnis ke, anstataŭ redukti, plimalgrandigi, forĵeti, forigi, detrui kaj subtrahi – ĝi pligrandigas kaj adicias, ĉar ĝi likvidis sekve negustecon, neordinarecon, nekredon, nesaton kaj neforton. Sed poste denove komencis fariĝi maldense ĉirkaŭ la rigardantoj. |
| "Ĉieloj!" diris Trurlo. "Mi esperas ke nenio malbona okazos el ĉi cio..." | – Ho ve! – diris Trurl. – Nur ne fariĝu io malbona de tio! |
| "Ne timu," diris Klapaŭcio. "Vi vidas ke ĝi ne faras Universan Nenion, sed nur kaŭzas la foreston de io ajn kiu komenciĝas per n. Kio estas vere nenio pri nenio, kaj nenio estas tio, kiun via maŝino, kara Trurlo, valoras!" | – Ne gravas! – diris Klapaŭcjo. – Ja vi vidas, ke ĝi tute ne faras Universalan Nenion, nur la Foreston de ĉiuj objektoj je "n", nenion okazos, ĉar via maŝino estas tute por nenio! |
| "Ne estu ruzata," rediris la maŝino. "Mi ekintas, vere, kun ĉio en n, sed nur pro kono. Krei tamen estas unu afero, sed detrui estas nepre alia. Mi povas forviŝi la mondon pro simple ke mi povas fari ion ajn kaj ĉion en n, kaj do Nenio estas tutfacila por mi. Post malpli ol minuto vi ĉesos havi estadon, kun ĉio alia, do diru nun, Klapaŭcio, kaj rapide, ke mi vere kaj fakte estas ĉio kiun mi estas programita esti, antaŭ ol tro malfruas." | – Tiel nur ŝajnas al vi – respondis la maŝino. – Mi komencis efektive de ĉio je "n", ĉar tiel estis al mi pli oportune, sed fari la objekton estas io tute alia ol forigi ĝin. Mi povas forigi ĉion simple tial, ke mi povas fari perfekte ĉion je la "n", do la Neesto estas por mi la bagatelo. Baldaŭ vi ne ekzistos kaj ankaŭ ĉio alia malaperos, tial mi petas vin, Klapaŭcjo, por ke vi diru rapide, ke mi estas vere universala kaj mi prave plenumas ordonojn, ĉar estos tro malfrue. |
| "Sed - " Klapaŭcio ĵus estis protestonta, sed rimarkis, ĝuste tiam, ke multaj aferoj ja malaperis, kaj ne nur tiuj kiuj komenciĝis per n. La konstruistoj ne plu estis ĉirkaŭata per la grunĉiloj, la targaliskoj, la ŝupopikoj, la kalinatifaktoj, la tistoj, vorĉoj, kaj pritonoj. | – Sed... – komencis timigita Klapaŭcjo kaj sammomente li rimarkis, ke efektive malaperas diversajn objektojn ne nur je la litero "n": ĉar ili ne estis jam ĉirkaŭigitaj de kambuzeloj, presiguloj, vitropkoj, grizmakoj, rimundoj, trepcoj kaj picimioj. |
| "Haltu! Mi reprenas ĝin ĉiu! ĉesu! Stop! Ne faru Nenion!" kriegis Klapaŭcio. Sed antaŭ ol la maŝino povis alveni tutan halton, ĉiuj la braŝaĵoj, plustroj, larioj, kaj zitoj estis formalaperintaj. Nun la maŝino staris senmove. | – Haltu! Haltu! Mi forvokas kion mi diris! Ĉesu! Ne faru Neeston! – kriis plenforte Klapaŭcjo, sed antaŭ ol la maŝino haltiĝis, malaperis ankoraŭ graŝakoj, plukvoj, fihdronoj kaj zamroj. Nur tiam la maŝino senmoviĝis. La universo aspektis terure. Plejparte suferis la ĉielo: oni |

| | |
|---|---|
| La mondo estis abomeninda vido. La ĉielo estis aparte suferinta: estis nur kelkaj, izolaj lumpunktoj en la ĉieloj - neniu lasaĵo de la gloraj vorĉoj kaj zitoj kiu estis, ĝis tiam, favorintaj la horizonton! | vidis sur ĝi nur solajn punktojn de steloj, senpostsigne malaperis belegaj grizmakoj kaj gvajdolnicoj, kiuj ĝistempe plibeligis la ĉielsferon. |
| "Je Gaŭss!" kriis Klapaŭcio. "Kie estas la grunĉiloj? Kie miaj karaj, preferataj pritonoj? Kie nun la ĝentilaj zitoj?" | – Ho ve! – ekkriis Klapaŭcjo. – Kaj kie estas la kambuzeloj? Kie estas miaj plej amataj murkvioj? Kie estas la ĝentilaj picimioj?! |
| "Ili ne plu estas, kaj neniam poste ekzistos denove," la maŝino diris kalme. "Mi elfaris, aŭ plie nur ekelfaris, vian ordonon..." | – Ili ne ekzistas plu kaj neniam ekzistos – respondis trankvile la maŝino. – Mi faris, prefere komencis fari nur tion, kion vi al mi ordonis... |
| "Mi ordonis ke vi faru Nenion, kaj vi... vi..." | – Mi ordonis, ke vi faru Nenion, kaj vi... vi... |
| "Klapaŭcio, ne ŝajnigu esti pli ega stultulo ol vi ja estas," diris la maŝino. "Se mi farus Nenion ele, en unu subita okazo, ĉio ĉesus ekziston, kaj tio enhavas Trurlon, la ĉielo, la Universo, kaj vi - kaj eĉ mi mem. Tiuokaze, kiu povus diri kaj al kiu direblus ke la ordono ekfariĝis kaj mi estas efika kaj kapabla maŝino? Kaj se neniu povus diri ĝin al neniu, kiel do mi, kiu ankaŭ ne estus, estus pravigota?" | – Klapaŭcjo, aŭ vi estas malsaĝulo, aŭ vi simulas malsaĝecon – diris la maŝino. – Se mi farus Niecon unuvice, subite, ĉio ĉesus ekzisti, do ne nur Trurl kaj la ĉielo, kaj la Kosmo, kaj vi, sed ankaŭ eĉ mi. Do kiu kaj al kiu povus diri, ke la ordono estis plenumita kaj ke mi estas funkcianta maŝino? Kaj se neniu al neniu tion dirus, kiamaniere mi, ankaŭ ne ekzistanta, povus ricevi la propran kontentecon? |
| "Jes, bone, ni lasu la temon," diris Klapaŭcio. "Mi havas nenion pli petenda de vi, krom bonvole, kara maŝino, bonvole redonu la zitojn, ĉar sen ili la vivo perdas ĉiom da sia ĉarmo..." | – Bone, vi pravas, ni ne parolu plu pri tio – diris Klapaŭcjo. – Jam mi nenion volas el vi, beleta maŝino, mi nur petas, faru murkviojn, ĉar sen ili mi ne ŝatas la vivon... |
| "Sed mi ne povas, ili estas en z," diris la maŝino. "Kompreneble, mi povas redoni napalmon, naŭzon, naziismon, neglekton, nevusojn, kaj nokaŭtojn (kaj novialistojn). Pri la aliaj literoj, tamen, mi ne povas helpi vin." | – Tion mi ne scipovas, ĉar ili estas je la "m" – diris la maŝino. – Certe mi povas denove fari negustecon, neordinarecon, nekredon, nesaton kaj neforton, sed por la aliaj literoj min ne petu. |
| "Mi volas miajn zitojn!" mugis Klapaŭcio. | – Sed mi volas murkvojn! – kriegis Klapaŭcjo. |
| "Bedaŭrinde, neniujn zitojn," diris la maŝino. "Prenu bonan rigardon al tiu ĉi mondo, kiel distruita ĝi estas per egaj, oscedantaj truoj, kiel plena per Nenioeco, la Nenioeco kiu plenigas la senfundan senecon inter la steloj, kiel ĉio ĉirkaŭ ni surŝtofiĝis per ĝi, kiel ĝi malhele kaŝiĝas malantaŭ ĉiu peco da matiero. Jen via verko, enviulo! Kaj mi apenaŭ kredas ke venontaj generacioj benos vin pro ĝi." | – Ilin mi ne faros – diris la maŝino. – Bonvolu rigardi la universon, kiel ĝi estas plena da grandegaj nigraj truoj, plena da Neesto, kiu plenumis la abismojn inter steloj, kiel ĉio ĉirkaŭe entenas la Neeston, kiel ĝi insidas en ĉiu randaĵo de ekzisto. Tio ĉi estas via verko, mia enviulo! Mie pensas, ke la sekvontaj generacioj vin ne benos por tio... |
| "Eble... eble ili ne trovos, eble ili ne rimarkos," ĝemis la sensanga Klapaŭcio, spektanta supre senkrede al la nigra videco de la kosmo kaj ne | – Eble ili ne sciigos... Eble ili ne rimarkos... – elbalbutis paligita Klapaŭcjo, rigardante senkrede la vanecon de la nigra ĉielo kaj ne |

| | |
|---|---|
| aŭdacanta rigardi sian kolegon, Trurlo, en la okulo. Lasanta lin apud la maŝino kiu povas fari ĉion komenciĝantan per n, li reiraĉis hejmen - kaj ĝis ĉi tiu tago, la mondo daŭris distruita per nenioeco, ekzakte kiel ĝi estis kiam ĝi estis haltita sur la vojo de sia propra foriĝo. Kaj ĉar ĉiuj postaj penoj krei maŝinon pri iu alia litero malsukcesis, estas timinda ke neniam plu ni havos tiel ravajn fenomenojn kiel la vorĉoj kaj la zitoj - ne, neniam plu. | kuraĝante eĉ turni al sia kolego.<br><br>Lasante lin apud la maŝino, kiu scipovis ĉion je la "n", li kaŝe revenis hejmen – kaj la universo ĝis la hodiaŭa tago restis jam truigita de Nenieco – same kiel dum la ordonita nuligo Klapaŭcjo haltis ĝin. Kaj ĉar oni ne sukcesis konstrui maŝinon je iu alia litero, oni timas, ke jam neniam revenos la grandiozaj fenomenoj kiel picimoj kaj murkvioj. |